
INFORMILO DE KKE — KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ

Cooperativa Cultural dos Esperantistas Ltda. — Av. Treze de Maio, 47, sobreloja 208 — Centro
Rio de Janeiro - RJ — CEP.: 20031-921 (21) 2544-4314 Fax: (21) 2220-7486
retpoŝta adreso: esperanto.kke@gmail.com ttt-paĝo: www.kke.org.br

Nº 51**8ª JARO (NOVA FAZO)****JULIO-AŬGUSTO/2009**

SYLLA CHAVES NE PLU INTER NI



(1929 - 2009)

Eventos

Mai, 4 – Roda literária / Prosa em esperanto.

Mai, 6 – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

Mai, 8 – Palestra de Sylla Chaves sobre o tema *Kiel esperantigi brazilanojn*, com a presença de 17 pessoas.

Mai, 11 – Roda Literária / Poesia em esperanto.

Mai, 13 – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

Mai, 15 – Palestra de Laura Pereira de Alcântara sobre *Placo XV-a: Historio kaj Kuriozaĵoj*, com a presença de 8 pessoas.

Mai, 18 – Roda Literária / Literatura brasileira em esperanto.

Mai, 20 – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

Mar, 22 – Palestra de Jair Salles sobre *Estudo Comparativo do Esperanto com Outros Idiomas Planejados*, com a presença de 14 pessoas.

Mai, 25 – Roda Literária / O estilo de Zamenhof.

Mai, 27 – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

Mai, 29 – *Festa dos Aniversariantes*, com a participação especial de *Leandro Turano* (pianista) e presença de 22 pessoas.

Jun, 1 – Roda Literária / Prosa em esperanto.

Jun, 3 – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

Jun, 5 – Palestra de Márcia Braga de Oliveira sobre *Diário de uma Técnica de Necropsia: Encontro e Aprendizado*, com a presença de 11 pessoas.

Jun, 8 – Roda Literária / Poesia em esperanto.

Jun, 10 – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

Jun, 12 – Palestra de Jefferson Sampaio sobre *Transgenaj Manĝaĵoj kaj Retoj de Konsumo*, com presença de 10 pessoas.

Jun, 15 – Roda Literária / Literatura brasileira em esperanto.

Jun, 17 – Clube de Conversação / Bate-papo com J. Salles.

Jun, 19 - Palestra de Edmo Lutterbach sobre *A Importância de Euclides da Cunha na Literatura Brasileira*, com a presença de 14 pessoas.

Jun, 22 – Roda Literária/O estilo de Zamenhof.

Jun, 24 – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

Jun, 26 – *Festa dos Aniversariantes*, com a participação especial de *Nilson Bulhões* (violão e voz) e com a presença de 35 pessoas.

Doações para a Caixa Geral

Givanildo R. Costa: R\$ 100,00;
Rosana Caraméz: R\$ 100,00;
Jurguy Scherpell: R\$ 100,00;
Olímpia P. Sandora: R\$ 124,00;
Marilene Azevedo: R\$ 28,10;
Anônimos: R\$ 659,00 *Koran dankon al ĉiuj!!!*

Doações para a campanha Esperanto nas Bibliotecas

Luiz Carlos Franco: R\$ 180,00.
Maria das Graças Carâp: R\$ 20,00 *Dankon al la donacintoj!!!*

Novos Associados

1720. Fernando José Pedrosa Maia Jr.; 1721. José Jenuíno Maciel Lopes; 1722. Nei Marcos Castro Grimaldi; 1723. Manoel Pereira de Oliveira; . *Estu ĉiuj bonvenaj!*

Expediente

InKo, boletim informativo da Cooperativa Cultural dos Esperantistas; edição nº 51, julho-agosto/2009.

Coordenação: Givanildo R. Costa, Presidente da KKE.

Redação: Aloísio Sartorato

Revisão: Célio F. Martins

AMiNDA ESPERANTA FRATO

Tutcerte mi ne scias bone materialigi surpapere tion, kion li reprezentas por ni, brazilaj esperantistoj aŭ ne, per vortoj ĉu konsentaj, ĉu homaranismaj, ĉu belartpoezia, ĉu estrarkapablecaj, ĉu movadkunordigaj, ĉu kreivliteraturaj, ĉu mondcivitanaj, ĉu amfrataj, ĉu kio pli? Ververe priskribi Sylla Magalhães Chaves estas tasko tre vasta kaj malfacila por mi. Li, kiu estis unu el la plej gravaj samideanoj el la tuta mondo, kiu ekaperis en ĉi tiu fazo de nia moderna vivo pro lia genieco, lia laborkapableco, lia amdeklaro al la homaro.

Ni scias ke laŭ la esperantista monda movada historio, multaj gesamideanoj en pluraj landoj multe faris kaj faras, tiamaniere ke iliaj agadoj fariĝis sinonimo de la propra esenco de E-o. Sylla Chaves estis unu el ili.

Se la monda esperanta komunumo tre respektas lin, imagu pri ni, brazilanoj, kiuj ĝuis tre proksiman kunvivadon kun li! Mi mem multe lernis. Mi memoras ke en tiu tempo, kiam mi estis komenclernanto de la lingvo, disvastigante ĝin en la spiritisma medio, kiom da fojoj ĉeestante lian esperantan instrumentodon, ravite mi taksis kiom kreiva estas tiuj homo, kapabla instrui Esperanton al personoj el la plej diversaj kultur niveloj.

Ne estas senkiale, ke Sylla Chaves fariĝis membro de nia Akademio de Esperanto, kiu estas, kune kun UEA, unu el la plej gravaj E-institucioj de la monda Movado. Atestis pri lia intelekta kaj esperanta kapablo homoj el pluraj sferoj de la mondo okaze de lia forpaso, kiel ekzemple, la hinda samideano kaj prezidanto de Universala Esperanto-Asocio. Probal Dasgupta, dirante "... mi ne havis la privilegion rekte koni lin persone, sed ni servis en la sama Akademio de Esperanto. Sen lia listo de oficialigendaj vortoj la revolucio lastatempa en la laborado de nia Akademio ja ne estus okazinta."

Kiaj belaj vortoj venis per pluraj retmesaĝoj okaze de lia forpaso fare de eminentaj brazilaj kaj alilandaj samideanoj, laŭdantaj nian karegan amikon, aŭtoro de diversaj esperantaĵoj, kiel lernolibroj, muzikoj, vortaroj, poeziaĵoj ktp.

Kiom da helpoj li donis al ni. Mi memoras, ke kiam mi estis prezidanto de nia ŝtata esperantista asocio (AERĴ), dum iom pli ol 10 jaroj, lia apogo estis tre grava kaj definitiva. Kaj nuntempe, kiom nia KKE ŝuldas al li pro kleraj prelegoj kaj konsciigaj atentigoj, pro monhelpaj rimedoj kaj precipe pro esperantaj verkaĵoj, inter aliaj. Do kiel mi klarigis en la komenco de ĉi tiu artikolo, diri ion pri Sylla Chaves estas tre malfacile, ĉar lia agado estas multflanka.

Por fini, mi, kiel spiritisto, direktas kelkajn vortojn rekte al vi: "Karega Amiko kaj Frato Sylla Magalhães Chaves, estis grandega plezuro koni vin kaj ĝui vian ĉeeston inter ni. Mi elektis por citi tie ĉi parton de unu el viaj poemoj: "Kial sinjoroj?", kiu bone reprezentas vian animan sintenon:

Mi dezirus, ke l' vivo
Estu himno pri am!
Ke en voĉ' de infano
Frue sonu ĝi jam!
Ke la homoj sin amu,
Tra la mondo sen bar'
Kaj la leĝoj proklamu:
"estas frata homar'!"

Dio kaj Jesuo benu vin!!! Dankon pro ĉio!

Givanildo Ramos Costa

ĜIS REVIDO, KARA AMIKO!



Estis sabato, la 30-a de Majo. Mi estis hejme, konsultante miajn retroŝtajn mesaĝojn, kiam subite la telefono sonoris. Mi respondis al la telefonavoko kaj ĉe la alia flanko mi rekonis la voĉon de samideano Alfredo Aragón, kiu malĝojtone parolis al mi: “Mi havas malĝojan informon por vi – nia kara amiko Sylla ĵus forpasis”.

La novaĵo falis sur min kvazaŭ fulmo! Ne, ne povas esti vero! Unuamomente, mi ne sukcesis kredi tion. Kvankam lastatempe li havis sanproblemetojn, tamen nenio grava, kiu povus rezulti je lia tuja morto. Malgraŭ, ke en la lastaj monatoj li kvazaŭ signis, ke li baldaŭ forpasos.

En la postaj momentoj de tiu komuniko de Aragón mi rapidis informi per retmesaĝoj al la brazila kaj tutmonda esperantista komunumo pri tiu malĝoja evento. Sed poste pli trankvile mi komencis rezoni pri la grava perdo, kiun havis mi, la brazila kaj la tutmonda movado.

Mi memoras, ke en la antaŭa tago de lia forpaso li normale parolis kun mi per telefono. Tiam li sciigis min pri siaj lastaj laboroj rilataj al la dudirekta vortareto Esperanta-portugala / portugala – Esperanta, kiun li estis finpretiganta por lanĉo en Septembro. De tempo al tempo li telefonis al mi por aŭdi mian opinion pri lingvaj aŭ movadaj aferoj pri kio li okupiĝis. Mi ankaŭ multfoje telefonis al li por sondi lian opinion pri movadaj aferoj aŭ por klarigi dubojn gramatikajn aŭ leksikajn.

Kiel organizanto de kulturkunvenoj de KKE mi ĉiam povis kalkuli pri lia partopreno kiel preleganto du aŭ trifoje jare. Ankaŭ pri lia partopreno, kiel deklamisto, en artaj prezentadoj, precipe en Poeziaj Vesperoj.

Kaj kion diri pri la granda manko, kiun li faros rilate al la brazila E-movado? Sylla estis prezidanto de Brazila E-Ligo, de 1978 ĝis 1981, kaj tiam li cementis la vojon al la paciĝo de la tiama E-movado, kiel peranto inter la malnova kaj la nova Ligo renaskiĝonta per la

kunfandiĝo de BEL kaj Brazila Konsilantaro de Esperanto. La brazila movado estis konstanta zorgo lia kaj denove en 2007 li agis kiel peranto, okaze de la elekto de la lasta estraro de BEL en tiu jaro, organizante ĝin.

Kaj kiel taksu lian gravan kontribuon por la tutmonda movado kaj lingvo? Sylla estis ano de la Akademio de Esperanto, inter 1986 kaj 1996, kaj dum tiu periodo li grave kontribuis en la diskutado kaj voĉdonado de pluraj lingvaj rezolucioj de tiu institucio. De tiu akademia laboro naskiĝis kunlaboro precipe kun Renato Corsetti kaj Bertilo Wernengren. Jam estante for de la Akademio, kaj kiel korespondanta membro de tiu institucio, li intime kunlaboris kun Bertilo, kiu estas direktoro de la sekcio “Ĝenerala Vortaro”, en la farado de la lasta listo, kiu oficialigis novajn vortojn en Esperanto. La merito lia estis rekonita en la enkonduko de tiu lasta Rezolucio, kie oni menciis lin kiel elstaran kunlaboranton en la farado de la proponita listo.

Sylla estis multifaceta esperantisto kaj homo. Iam en la okdekaj jaroj kiam mi devis verki artikolon pri li por *BEL Informas*, la tiama informbulteno de BEL, parolante pri lia agemo mi skribis, ke “Sylla ne estas nur homo, sed vera institucio”, kaj tiam mi titoligis la artikolon SYLLA CHAVES ESPERANTO-ASOCIO. La saman problemon mi alfrontas nun, kiam mi devas skribi pri lia riĉe enhava vivo. Do mi dividu la temon laŭparte.

LA HOMO SYLLA CHAVES

Sylla Chaves naskiĝis la 2-an de Junio 1929, en la sudbrazila urbo Santana do Livramento, ŝtato Rio Grande do Sul, Brazilo, urbo situanta tre proksime al la brazila-urugvaja landlimo. Laŭ Sylla mem “li estis filo de la poliglotaĵo gepoetoj Tullio kaj Zillah Chaves”, kiujn li profunde amis. Sylla ne estis sola filo. Li estis la kvina el ses gefiloj de gesinjoroj Chaves: Marília, Mario, Lúcia, Lívio kaj Flavio, kun kiuj li havis bonegajn rilatojn. Sylla alte aprezis la familiajn valorojn, kiujn li bone tradukis en la muzikteksto de “Familio estas Ĉio”:

Mi rememoras mian tempon de printempo
apud patro kaj patrin’!
Por infanoj familio estas ĉio....
sed ne ĉiuj havas ĝin.

La familio estas bela
don’ ĉiela!
En la preĝoj petu ni,
ke por infanoj de la mondo,
en estonto,
ne plu manku famili’.

Estis en la familia sino, ke Sylla lernis ami Esperanton. Lia unua kontakto kun la lingvo internacia okazis en 1936, kiam Mário Prestinari, fervora gaŭĉa esperantisto, konvinkis la tutan familion lerni Esperanton. Li mem konfesis, ke de tiu epoko restis en lia memoro kelkaj vortoj kiaj *kokideto*. Kaj estis danke al la bone organizitaj kajeroj de sia fratino Marília, ke li jarojn poste sukcesis serioze komenci la lernadon de Esperanto. En 1937 la tuta familio

transloĝiĝis al Rio-de-Janeiro, kie li en 1946, post memlerno kaj legado de du libroj, informiĝis pri la ekzisto de Brazila E-Ligo kaj fariĝis “profesoro aprobita” post ekzameno kun la fama Porto Carreiro Neto. Kaj en la libro *Não só Idealistas mas Realizadores* li asertas ke “en tiu jaro mi ne nur lernis la lingvon, sed alproprigis al mi por la tuta vivo la ideologion de Esperanto”.

Pri lia profesia vivo, estas interese scii, ke li volis esti arkitekto, tamen studis Juron, fako en kiu li diplomiĝis en 1954. Sed jam en 1950 li estis aprobita en internacia konkurso kaj fariĝis oficisto de la Sekretariejo de UN, en Novjorko, urbo kie li loĝis inter 1950 kaj 1953. Tamen lia ĉefa profesia okupo estis tiu de profesoro, precipe pri komunikado, en supera lernejo de administrado ĉe Fundação Getúlio Vargas, en Rio, dum pli ol 40 jaroj ekde 1953. Inter 1954 kaj 1956, li studis politikan sciencan en Parizo, kiel stipendiito de UN. Kaj inter 1957 kaj 1960, li loĝis en Parizo, kie li laboris ĉe la Sekretariejo de UNESCO, post partopreno en internacia selektado. En 1970 li iris denove studi, kiel stipendiito de la usona registaro, en Kalifornio, Usono, kie li magistriĝis pri komunikado en 1970. En la 80-aj jaroj li estis dum du monatoj invitita profesoro en la Instituto pri Kibernetika Pedagogio de la Universitato Paderborn, Germanio.

Alia signo de lia aprezo al familianoj okazis en la 80-aj jaroj, kiam li mendis al Paulo Sérgio Viana la esperantigon de verko de sia frato Mario Chaves – *Sano, strategio por ŝanĝo* – kaj proprakoste publikigis ĝin.

LA PRODUKTEMA ESPERANTISTO

Dum sia esperantista vivo, Sylla agadis multflanke.

Unue ni reliefigu lian poetan faceton. Jam en la 50-aj jaroj li verkis siajn unuajn poeziaĵojn en Esperanto. Kultura Kooperativo de Esperantistoj kunigis ilin en unu ekzempleron kaj publikigis en 1959 lian unuan poemlibron: *Animo Prisma*.

La 60-aj jaroj signas la internacian rekonon de lia poezia talento. Dufoje li estis premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA. Unue, en 1962, en Kopenhago, kiam li ricevis la unuan premion de Esperanta originala poezio pro *Homara Epopeo* (Kanto 1, strofoj 1-9 kaj 26-30). Poste, en 1968, en Madrido, kiam li ricevis la trian premion de Esperanta tradukita poezio pro la traduko de la poemo *Himno*, de J. G. de Araújo Jorge, kaj honoran mencion en tiu sama konkurso pro la traduko de *Destino*, de Cecília Meireles.

En 1970, Fundação Getúlio Vargas publikigis dulingvan libron verkitan de li titolitan *Por um Mundo Melhor através da Poesia e do Esperanto / Por pli bona mondo tra poezio kaj Esperanto*, kiu inkludis novajn poeziaĵojn. En tiu sama jaro li organizis, pretigis kaj eldonis proprakoste longdaŭran diskon titolitan *O Brasil canta por um mundo melhor / Brazilo kantas por pli bona mondo*. Li kunigis profesiajn muzikistojn kaj kantistojn (Maestro Cipó, Aurora Miranda, Antônio João kaj Franca Fenati), kiuj registris belajn interpretojn de klasikaj muzikoj de la brazila populara kanzonaro.

Em 1978, maltrankvila pri la situacio de la tiama brazila E-movado, kiu havis tri landajn

organizaĵojn (Brazila E-Ligo, Kultura Kooperativo de Esperantistoj kaj Brazila Konsilantaro de Esperanto), li decidis fariĝi movada gvidanto. Koscia pri la rolo, kiun li povos plenumi kiel ponto inter malnova kaj nova generacioj de esperantistoj, li kandidatiĝis kaj fariĝis prezidanto de Brazila E-Ligo. Dum lia oficperiodo li klopodis ne nur establi bonajn rilatojn kun la aliaj landaj organizaĵoj, sed cementis la vojon, kiu kondukis jarojn poste, en la oficperiodo de Fernando Marinho al la kunfandiĝo de BEL kaj BKE. Ankaŭ menciinda estas la fakto ke tuj post lia enposteniĝo li revenigis BEL al la sino de UEA kiel landa asocio aliĝinta.

Ankoraŭ en lia oficperiodo en BEL li produktis kaj eldonigis du kompaktnajn diskojn: *La Alfabeto de Esperanto kaj facilaj frazoj kaj Kantu kaj Lernu* (tradiciaj kaj folkloraj kanzonoj kun tekstoj de Sylla Chaves, kunigante la muzikestron Amâncio Cardoso kaj la gekantistojn Nadir de Oliveira, Maria Alice Cabral, Franca Fenati kaj Joel de Castro). Li ankaŭ zorgis pri pluraj represigoj de *Vocabulário de Carlos Domingues* kaj verkis la suplementon aldonitan al ĝi en ĝia dua eldono en 1989. En 1984, li verkis kaj publikigis sian lernolibron *Aŭdu kaj Lernu*. De tiu sama jaro estas liaj *Didaktikaj Kantaroj 1 kaj 2*, kunigante muzikteks-tojn kaj partiturojn de folkloraj kaj popularaj brazilaj kanzonoj. Estas de 1986 aliaj tri legolibroj liaj, same publikigitaj de li: *Nova Amiko inter Ni*, *Libera Ekflugo* kaj *La estonto dependas de ni*. En tiu sama jaro li fariĝas membro de la Akademio de Esperanto, kie li restis ĝis 1996. En 1989, kunlabore kun Kultura Kooperativo de Esperantistoj li verkis la suplementon al la *Grande Dicionário Esperanto/Português*, de Ismael Gomes Braga – 2-a eldono.

En 1989, aperis, laŭ mi, unu el liaj plej utilaj laboroj, t.e., la libro *Cent Jaroj da kantado en Esperanto (1887-1987)*. Sylla, helpata de la muzikestro Alfredo Aragón, kompilis 140 muzikojn de la tuta mondo, kun ties partituroj kaj muzikteks-toj. En ĝi li kunigis tri kolektojn da kantoj, nome, instrucelaj kantoj (entute 25), pliaj originalaĵoj kaj tradukoj de li mem Sylla (jes, li ankaŭ estis komponisto!), entute 45, kaj antologieto kun entute 70 kantoj de 43 esperantistaj aŭtoroj.

En 1991 ankaŭ aperis alia tre grava kaj utila titolo de lia vasta verkaro. Temas pri *Originala Esperanta Bildvortaro*, kiu konsistis el 92 bild-paĝoj kun preskaŭ 3.000 bildigitaj vortoj. En tiu sama jaro, li ricevis la premion *Onisaburo Deguĉi* (el Japanio), pro uzado de Esperanto por monda paco kaj homara feliĉo. En 1992, pro lia merita laboro Esperanta, li fariĝis Honora Membro de UEA.

Sekvis en 1995/1996 lia *Rapida Kurso de Esperanto*, kaj la legolibro *La Juna Verkisto kaj Varia Bukedo*. De 1998 estas lia *Kvin-Ŝtupa Morfemaro* kies ĉefa celo laŭ li “estas kontribui por ke Esperanto restu unueca”. De tiu sama jaro estas unu el liaj plej popularaj verkoj: *O Esperanto num Relance*. En 1999, aperis la unua eldono de alia populara verko lia: *Dicionário do Principiante*. Estas ankaŭ de tiu sama jaro la kolekto de sep malgrandformataj legolibretoj por komencantoj, nomataj “facilaj legaĵoj” (*Rapida Vojo, En la kongreso, Sep Leteroj, La Juna Verkisto, Nova Amiko inter Ni, Varia Bukedo kaj Unu tago en la vivo de Teodoro*).

En la komenco de la nova jarmilo Sylla revenis denove al la produktado de aŭdvida materialo. La unua, kiu aperis, estis “*Gotas de Esperanto*”, serio da vidbendoj, kiuj registris samnoman kurson prezentitan per Eduka TV, de Rio-de-Janeiro, en kunlaboro kun la

filantropia institucio Lar Fabiano de Cristo. Li ankaŭ produktis la videojn *A Sonoridade do Esperanto* kaj *Plurspecaj Eroj por Arta Vespere*. Tiu-ĉi lasta estis premiita en la sekvanta jaro en la Belartaj Konkursoj okaze de la Universala Kongreso de UEA en Fortalezo –. En tiu sama periodo li helpis Neide Barros Rêgo en la produktado de la video *Neide kantas*. Ankaŭ de tiu periodo estas lia KD *Elektitaj Kantoj de Sylla Chaves pri Paco, Amo kaj Naturo*.

En postaj jaroj, en kunlaboro kun Kultura Kooperativo de Esperantistoj, li aperigas la jenajn KD-ojn: *Kio estas Esperanto? (por komencantoj)*, *El la brazila juvelujo* kaj *El la monda trezoro*. Pro aŭtorrajtaj motivoj, tiuj KD-oj ne estis venditaj, sed senpage donacitaj al tiuj, kiuj aĉetis alijan materialojn de lia produktado.

En 2003, indikita de Edmo Lutterbach, li fariĝas enlanda korespondmembro de grava cultura organizaĵo – “*Academia Fluminense de Letras*” (*Beletra Akademio de ŝtato Rio-de-Janeiro*).

En 2006 okazis unu el la plej produktivaj kunlaboroj de Sylla Chaves, ĉi-foje kun Neide Barros Rêgo. De tiu intensa kunlaboro rezultis du gravaj verkoj de lia bibliografio: *Brazila Esperanta Parnaso*, konsistanta el 307 poemoj el 178 brazilaj poetoj, kaj *Poesias Escolhidas do Brazila Esperanta Parnaso*. Komprenible en ambaŭ kunaŭtoris Neide Barros Rêgo. Ambaŭ libroj estis lanĉitaj en 2007, okaze de la Brazila Kongreso de Esperanto, en Rio-de-Janeiro, kiu celebris la centjariĝon de Brazila Esperanto-Ligo.

En 2008, Sylla revenis al siaj vortaraj laboroj kaj en Julio de tiu jaro li lanĉis en Fortaleza, okaze de la BKE, sian *Oportuna Poŝvortaro Esperanta-Portugala*, utilan manvortaron kun 12.000 artikoloj. Ĝi estos la komenca ŝtupo de pli ambicia plano: la lanĉo en Septembro ĉi-jare de pli ampleksa vortareto dudirekta (Esperanto-portugala / portugala/Esperanto), laboro preskaŭ finita, sed abrupte interrompita pro lia morto, kiu ankaŭ malpermesis la dediĉon al la de li longe prirevata laboro – PRAV (**Praktika Vortaro de Esperanto**), vortaro de Esperanto, kun difinoj de la vortoj en Esperanto.

KONKLUDO

Eble multe pli estus direbla pri la tuta laboro de Sylla. Tamen mia kapo ne sukcesas memori pri ĉio rilate al li. Sed la esenco estas dirita.

Mankas nur atentigi pri unu fakto. Ke li, Sylla, dum sia tuta vivo estis ĉiam fidela al la Zamenhofaj idealoj kaj lia konduto estis ankaŭ kohera al la ideologio de la Esperanto-movado. Kaj nenio pli bone resumas ĉi tiun lian sintenon ol la dediĉo, kiun li verkis por la *Brazila Esperanta Parnaso*:

“Ni dediĉas tiun ĉi antologion al ĉiuj, kiuj pace batalis aŭ batalas por la starigo de pli bona mondo, sendepende de iliaj kredoj kaj naskiĝlandoj – mondo kun pli da amo kaj toleremo, malpli da monavido kaj pli da respekto al la naturo, kiu nin ĉirkaŭas”.

Aloísio Sartorato

LA TUTMONDA ESPERANTISTARO

KONDOLENCAS PRI SYLLA CHAVES

Estimataj samideanoj, Nia movado funebras. Forpasis SYLLA CHAVES, kies nomo jam delonge estas gravurita en la ora historio de Esperanto. Kiel taksu la valoron de tiu multflanka batalanto, kiu senlace dediĉis sian tutan vivon al nia idealo? La kolosan heredaĵon de li sendita al la estonto ni elkore dankas. La gloro de SYLLA CHAVES, neanstataŭigebla samideano, restu inter ni kiel heroa flamo, pri kiu ni devas zorgi. **José Leite de Oliveira Junior, Kunordiganto de Kurso de Esperanto Federacia Universitato de Cearao**

Ja tre grava, ne facile riparebla perdo por la esperantista familio, brazila kaj tutmonda. Sylla, ekde siaj komencaj poresperantaj laboroj, antaŭvidigis plej brilan karieron, kiun li paciencie, metode, kompetente konstruadis ĝis li fariĝis plej aŭtoritata voĉo sur la diversaj kampoj, en kiuj manifestiĝas la Lingvo Internacia de D-ro Zamenhof. Pro lia nekontestebla multmerita valoro, li havigis al nialanda movado fierindan lokon inter la tutmonda esperantistaro. Nun, laŭ mia kredo, li prepariĝas por feliĉiga rikolto el sia riĉa semado. Honoron kaj dankon al nia kara frato, amiko kaj samideano! **Afonso Soares**

Mi kondolencas kaj bedaŭras ĉar forpasis grava Esperantisto. Tutkore **Velibor Simovic' – Bora**

Kara Aloísio, Akceptu mian kondolencon. Tre triste, sed ĉiam amike, **Anjo**

Sendube la brazila esperanto-movado perdis la plej gravan esperantiston nuntempan. La granda lumturo ne estas plu inter ni. Ni ĉiuj estas orfoj. Nome de EASP, mi petas de vi la komplezon, transdoni al liaj gefamilianoj niajn sincerajn kondolencojn. Kore kaj amike, **José Martins Coelho**

Aloísio, Mi petas al vi ke vi bonvolu transdonu miajn kondolencojn al la familio. Ni bedaŭras la morton de Sylla Chaves, tamen lia vivo estas ĉiel plene laŭdinda. Nia movado multon ŝuldas al li. Mi kondolencas ĉiujn vi amikojn Rioajn, ĉar por vi tutcerte la perdo estos multe pli granda, kaj vi ĉiusemajne, se ne ĉiutage sentos forte dumlonge lian mankon. Foriris granda amiko, sed tutcerte por engaĝiĝi en pli noblaj laboroj al kiuj tutcerte Esperanto ne estos for. **José Mário Marques**

Ege malĝojigas ni, kiam homoj kiaj prof-ro Sylla Chaves forlasas la idealan laborejon. Nenio tamen estas pli kuraĝiga ol la vivekzemplo de tiaj homoj, kiuj fordonas sian tempon kaj energion al plenumado de aktivado celanta kolektivon. La esperantista komunumo perdas hodiaŭ valoran pacamanton, pedagogon kaj pioniron en la produktado de avangardaj didaktikaj E-materialoj por enlandanoj. Plej konvena maniero honori la memoron de tiel grava aktivulo estas per laboro konstante frapanta ĝis traboro de manko de fido al la afero Esperanto. Kore kondolencas la familianojn kaj ĉiujn verdajn rianojn. **Tenorjo**

Miajn elkorajn kondolencojn samideano. Estu bonfarta kaj konservu la bonan nomon de la forpasinto, amike, **Bardhyl Selimi, Tirana, Albanio**

Mi dankas la informon karulo! Mi esperas ke ĉio estas pace kun li kaj liaj familianoj kaj amikoj. Miaj funebraj sentimentoj el la nordo de la mondo! **Gert Bolten Maizonave (Danio)**

La novaĵo pri la morto de Sylla Chaves ege surprizis min. Nur antaŭ unu monato ni ankoraŭ estis farantaj planojn pri nova vortara laboro. Malaperas granda esperantisto. Al ĉiuj liaj proksimuloj kaj al ĉiuj brazilaj esperantistoj, nome de la Akademio de Esperanto, kies membro li estis de 1986 ĝis 1995, kaj kies korespondanto li estis poste, mi prezentas la kondolecon de ĉiuj liaj akademiaj kolegoj. Honore al li mi ŝatas atentigi ĉiujn pri lia lasta vortaro: *Oportuna Poŝvortaro Esperanta-Portugala, Rio-*

de-Ĵanejro: Eldonejo Oportuno, 2008. Lia dediĉa teksteto estas la jena: "Mi dediĉas tiun ĉi vortaron al Claude Piron kaj al ĉiuj aliaj, kiuj klopodis, ke Esperanto restu la bona lingvo kreita de Zamenhof, sane kreskanta, akompananta la kompleksigon de la mondo kaj gardanta siajn denaskajn simplecon kaj fleksebelcon, por ke ĝi meritu fariĝi la pontlingvo de ĉiuj popoloj de la Tria Jarmio Ĉi tiu spirita testamento meritas esti primeditata de ĉiuj. Bedaŭre, **Renato Corsetti, Sekretario de la Akademio de Esperanto**

Estimata samideano Sartorato Dankon pro la informoj. Pere de vi – se vi bonvolos tion ĉi peri – mi volus esprimi kondolencojn en la nomo de Universala Esperanto-Asocio, de kiu Sylla Chaves estis honora membro, kaj en mia propra nomo: mi ne havis la privilegion rekte koni lin persone, sed ni servis en la sama Akademio de Esperanto. Sen lia listo de oficialigendaj vortoj la revolucio lastatempa en la laborado de nia Akademio ja ne estus okazinta. Mi ne tute certas pri la horzonaj diferencoj, sed – ĵus aŭdinte la novaĵojn – timas, ke la funebran omaĝmomenton mi verŝajne maltrafis. Bonvolu tamen komuniki al lia familio kaj al la ampleksa brazila komunumo, al kiu li apartenis, mian senton de neriparebla perdo pro lia forpaso. Mi esperas, ke la vigla laborado de la Akademio en la oficialigado de radikoj estas rigardebla kiel unu formo de omaĝo al li. Kunfunebre, **Probal Dasgupta, Prezidanto de UEA**

Amikoj, Kun bedaŭro mi eksciis pri la forpaso de Sylla Chaves. Li forpasis, tamen li vivas en siaj verkoj, en sia laboro por Esperanto. Kaj li pluvidas en la heredaĵo, kiun li donacis al ni, tutmondaj esperantistoj. Tiu heredaĵo implikas sindoneman agadon por Esperanto. Ni daŭrigu lian laboron, tio estas la minimumo, kion ni povas fari por omaĝi lin. Kondolence, **Tulio Flores**

Karaj kunlistanoj, La plej bona heredaĵo postlasebla de homo estas liaj verkoj. Sylla lasis grandan kontribuon al nia esperanta bretaro. Kie ajn li estu nun, ni dankas lin pro tio. **Pedro Cavalheiro**

Hodiaŭ mi kun larmoj ĉeestis en Rio la lastan omaĝon al nia kara poeto, profesoro, akademiano, tradukisto, stilisto, preleganto, pedadogo, vortaristo, idealisto, poligloto, kaj... granda homo Sylla Chaves. En la nomo de Brazila Esperanto-Ligo, mi salutis grupeton, kiu tie solidaris kun la familianoj. Mi ripetas al vi tion, kion mi tie diris: ni multe ŝuldas al li! Li brile kunigis fervoron kaj kompetentecon. Ni estas orfaj, sed li nun certe rikoltas la fruktojn de sia fekunda vivo. Sendube, la plej oportuna maniero omaĝi lin estas: uzi nian lingvon tiel, kiel li instruadis, kaj teni alte la torĉon de lia idealo. **Paulo Sergio Viana**

Kara Aloísio Sartorato, Mi ŝatus kondolenci la brazilajn s-anojn pri la forpaso de Sylla Chaves, kiel amiko, membro de la Akademio (kie ni kune servis dum tri jaroj, 1992-95), kaj nome de la Israelaj E-istoj. Amike, **Amri Wandel, Prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo**

Estimataj: Kun profunda ĉagreno mi eksciis pri la forpaso de Sylla, homo kiun mi sincere admiris pro liaj talentoj kaj sindona laboro por la Esperanto-Movado. Bv akcepti miajn kunsentojn de doloro en ĉi tiu momento. Kore **Atilio Orellana Rojas, Internacia Esperanto-Instituto**

Nome de BEL, mi bedaŭras la forpason de S-no Sylla Chaves, kiu estis grava homo por ĉi tiu institucio dum longaj jaroj, kaj kiu reprezentis la konservadon de Esperanto kiel vere internacia lingvo, per lia verko, kiu ĉiam instigis la geparolantojn al la uzado de simplaj formoj, kun pli precizaj signifoj. Oni omaĝu lin per la uzado de liaj vortaroj. En pli persona noto, mi bedaŭras la perdon de mia unua instruisto de la internacia... **Emerson Werneck, Publikaj Rilatoj kaj Pres-Asesoro de BEL**

Estimataj, mi kun trista koro sendas al la familio kaj al brazilaj esperantistoj kondolencojn pro forpaso de Sylla Chaves. Mi konatiĝis kun li en 1990 kiam mi faris rondvojaĝon tra Brazilo instruante en multaj urboj. Li estis vera aganto, diligenta kaj aktivega esperantisto. Esperantujo perdis brilan perlon! Sincere kaj amike **Tereza Kapista, Beograd, Serbio**

O 5º MARINHEIRO

Este é um número especial do nosso boletim “INKO”, inteiramente dedicado a uma merecida homenagem ao saudoso e famoso coidealista Sylla Chaves, que nos deixou 3 dias antes de completar 80 “primaveras”. Aliás, no caso de um grande poeta como ele, aplica-se bem a expressão “primaveras” – pois, além de poeta, era intensamente otimista e sempre “ligado” em algum interessante projeto. Deixou pronto o manuscrito do “Vocabulário Sylla Chaves”, Esperanto-Português e Português-Esperanto. Espera-se que o grande editor José Tenório, da Editora Oportuno, em São Paulo, consiga dar uma última possível revisão gráfica – e o publique o mais breve possível...

Sylla fez, também, várias obras didáticas – principalmente com o objetivo de veicular a poesia através de “canções didáticas”. A obra didática principal parece-nos ser o seu “Curso Básico”, com o subtítulo “Aŭdu kaj Lernu” (Ouça e Aprenda). Há vários anos, ele sugeria que os seus livros didáticos não só poderiam servir como o material inicial do estudo, mas também como um “reforço” para os alunos que tenham estudado por algum outro método. Concordamos plenamente com essa ideia de que os livros didáticos de um autor possam servir de “reforço” (autodidático) para os alunos que tenham estudado por outros livros didáticos. Assim, propomos o seguinte: Se você já estudou o Esperanto pelo nosso livro “Esperanto Conversacional” (Curso Básico), sugerimos que leia, também, algum ou alguns dos livros de Sylla, como “Nova Amiko Inter Ni”, “Varia Bukedo” (canções), etc.

Mas o multiforme talento de Sylla parece-nos ter-se destacado ainda mais na sua magistral poesia – como se pode comprovar através do seu primeiro livro de poemas, “Animo Prisma” (Alma Prismática), bem como pela sua recente e monumental antologia “Brazila Esperanta Parnaso” (Parnaso Brasileiro em Esperanto). Nessa antologia, como não poderia deixar de ser, brilha o poema “Kvin Dronintoj” (Cinco Náufragos), com estrofes em várias línguas, como Inglês, Francês, Espanhol e Russo – além do Português (na versão original), bem como no próprio Esperanto, naturalmente. Vale a pena ler – ou reler – o belíssimo poema. Para tanto, sugerimos que o leitor adquira a citada antologia, organizada cuidadosamente pelo próprio Sylla, contando com a preciosa colaboração da grande declamadora, poetisa premiada e cantora de Niterói, Neide Barros Rêgo.

O superpoema “Cinco Náufragos” narra a aventura de cinco marinheiros, de diferentes nacionalidades, que acabam se encontrando, perdidos, em uma ilha do Polo Norte. Em um dos brilhantes versos, narra Sylla: “De amizade sentem sede / Mas seus idiomas vede / É como que uma parede / Que separa os corações”... Logo no início, o marinheiro russo diz ao francês “Ya drug vach” (= Eu sou teu amigo). Mas o francês pensa que o outro o chamou de... “vaca” (“vache”, em Francês)... E ninguém consegue se entender... Enfim surge o quinto marinheiro... Este era um esperantista, que decide ensinar-lhes o Esperanto -- o idioma da paz... Mas quem seria este quinto marinheiro? Só recentemente descobri: – deve ser o próprio Sylla, que viveu para divulgar o Idioma Universal de Zamenhof... E o poema termina quando os cinco marinheiros, já entendendo-se através do Esperanto, vão... “singrando os mares verdes da paz...”



Sylla Chaves, kaj la metamorfozoj de la Vivo

Same kiel raŭpo fariĝas papilio, tiel Sylla forlasis nin. Jen homo kiu sin donis al la homaro planeddimensie. Lasas al ni strangan senton de perdo... Ni priploras lin, sed sen angoro kaj sen malespero, ĉar li donis al ni ĉion kion li povis doni: la plej trafajn instruojn pri digneco, honesteco, malavareco, pacemo, laboremo...

Ni forte bedaŭras lian foriron alidimensien. Kvankam li mortis, ni kredas ke Li vivas, ne nur simbole en niaj koroj, sed ankaŭ astralmaterie inter la elektitoj de Dio.

Kiel omaĝi lin? Pri tio mi multe rezonis, kaj alvenis al la konkludo, ke la plej bona omaĝo al li estas sekvi liajn paŝojn, sekvi liajn ekzemplojn de vera kristano. Lia vivo, kiel poeto, muzikkomponisto, verkisto, oratoro, lia vivo, en ĉiuj siaj aspektoj, karakteriziĝis kiel konstanta preĝo al la homa frateco, toleremo kaj interkompreno. Rigora rilate al si mem, kaj tamen indulga rilate al la aliaj. Klera, tamen simplanima, ĉar saĝa kaj luma, en la ekzistenciala dimensio de la Vivo.

Mi multon lernis de li kaj pere de li. Mi lernis la valoron kiu havas la priatento al pliaĝuloj..., ĉar mi, pro admiro kaj respekto, multe konversaciis kun li, kaj finfine, ambaŭ gajnis, li gajnis mian atenton kaj mi gajnis liajn instruojn... ambaŭ gajnis la ĝuon de reciproka altiro.

Sylla, Vi foriris, kaj tamen vi restas korpe en tiu-ĉi grundo, cindroforme en tiu-ĉi kambukao. Estas oportuna momento, ke oni meditu pri la du ĉefaj metamorfozoj de la vivo, nome la naskiĝo kaj la forpaso. Oni faru, ke nia naskiĝo estu utila kaj ke nia forpaso estu memorata laŭ niaj dumvivaj faroj.

Adiaŭ, Kara Sylla Chaves! La raŭpo fariĝis papilio. Flugu! Flugu for, en la astralan dimension de la Vivo! Dio vin benu! Ripozu, kun plena konscio de la devoj plenumitaj. Ni nenion plu povus postuli de vi, ĉar vi donis al ni ĉion! La 10-an de julio, 2009. **Célio Freitas Martins**